

**Numero: 326.**  
**Julio 2019.**

**27-a jarkolekto**

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



**Redaktanto**  
**Apáti Kovács Béla**  
**Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400**  
**Telefono: 06/20/497-03-64**  
**Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)**  
**Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO**  
**Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly**

# Pensoj

Oni pensas kaj la pensoj flugadas libere. Ili elflugas el la kapo kaj ili flugas kaj flugas ĝis la ĉielo.

Ŝajne nenio haltigas ilin. La libereco estas grandioza afero. Ĝi donas feliĉon al la homa animo kaj la feliĉo nutras la pensojn.

Kial oni starigas barilojn antaŭ la pensoj kaj kial oni tranĉas per akraj glavoj la liberecon?

Tion mi ne scias. Mi nur suspektas, la respondo kaŝiĝas en la homa stulteco.

Ekzistas homoj, kiuj ne ŝatas la flugantajn pensojn. Tiuj ĉi homoj timas ilin kaj kaŝiĝas en malhelan kelon por eviti la danĝeron.

Por tiuj ĉi homoj estas bona tia mondo, kie ne estas pensoj kaj anstataŭ ili iu ĉiam diras, kion fari.

Vivi indiferece kaj fari nenion estas ilia celo. La pensantoj estas priridintaj, eĉ primokitaj, kial ili lasas libere la flugantajn pensojn.

Eble iam estos tia mondo, kie ne estos kulpo la pensado. Oni ne rigardos strange al tiuj, kiuj kuraĝas pensi. Tiam el la ĉielo malsuprenflugos ĉiuj pensoj, kiuj dum la historio de la homaro suprenflugis. Tiu amaso da pensoj alportos por ni pli bonan kaj pli belan mondon.

Ne baru la vojon antaŭ viaj pensoj! Lasu flugi ilin libere ĝis la ĉielo.

Ridetu, se iu volas haltigi viajn pensojn kaj proponu al li aŭ ŝi por ke ili flugigu libere siajn pensojn.

Estas malfacile akcepti tiun ĉi novan mondon, kie la pensoj de ĉies homoj libere flugas sen bariloj.

Dum jarcentoj la pensoj estis bremsitaj kaj kiu lasis flugi libere sian penson, tiu estis punita.

Bedaŭrinde ankoraŭ nun en la dudek unua jarcento la pensokontrolistoj ekzistas.

Ili kontrolas vian cerbon tage kaj nokte. Ili ekzamenas viajn pensojn kaj ili serĉas, kiam elflugas el la kapo libera penso. Ili provas malhelpi ĝian flugon ĝis la ĉielo. Se fine tio ĉi sukcesas, tiam fanfarante ili diras: NI LABORIS BONE.

— Redaktanto —



# Kial lerni lingvojn!

Dum niaj lernojaroj ni lernas kelkajn fremdajn lingvojn. Onidire junaĝe la homa cerbo pli bone kaj pli rapide povas ensuĉi la lernendajn vortojn kaj gramatikon.

Rigardu la infanojn, ili ludante proprigas iun fremdan lingvon.

Se oni jam fariĝas plenaĝulo, tiam la lingvolernado jam estas pli malfacila. Krome, kiel plenaĝulo oni havas multe da laboro kaj ankaŭ la interesiĝo turniĝas al aliaj aferoj.

Tamen la lingvoscio estas necesa. En la nuna mondo, kiu ne parolas fremdan lingvon, tiu estas perdinta.

La terĝlobo malgrandiĝis. Dum kelkaj horoj oni povas ĉirkaŭflugi ĝin. Amasoj vojaĝas eksterlanden. Nun jam ne estas miraklo vojaĝi el Eŭropo al Usono.

Ĝuste hodiaŭ mi aŭdis en la radio, ke post kelkaj jaroj tiu ĉi vojaĝo daŭros malpli ol tri horojn per eksterordinaraj modernaj kaj rapidaj pasaĝeroaviadiloj.

Ankoraŭ en la komenco de la dudeka jarcento la marŝipoj transiĝis Atlantikan oceanon dum du semajnoj. La vojaĝo daŭris preskaŭ duonmonaton.

La mondo plirapidiĝis. Ĉiutagaj estas la komunikado inter diverslingvaj homoj. La rolo de la interpretistoj iĝis grava, eĉ de tempo al tempo ekaperas tradukmaŝinoj por plifaciligi la homan kontakton.

Krome milionoj da homoj komencas lerni iun mondolingvon pensante, ke per ĝia helpo malaperas la lingvaj bariloj.

Prave, oni devas scii fremdajn lingvojn.

Sed mi havas pli bonan ideon. La homaro akceptu Esperanton, kiel dua lingvo kaj ĝi helpus solvi ĉi tiun gravan problemon!

— Ŝaŝa —



## Urso Brundo, flava hundeto Žučko, Plutono nomata Ŝilja kaj maristo savanto

Urso Brundo loĝis senzorge en bela verda monto. Ĉio plaĉa estis je ĝia dispono. Tien alien, kie ajn via rigardo atingas kreskis sovaĝaj pomoj, bluaj dolĉaj beroj, piroj kaj mielo. Mielo. Ĉu vi vidis iam arbon plenan de mielo pendanta sur la branĉoj troviĝanta en la korbo plektita de abeloj? Jes, kompreneble vi tre bone scias, pri kio mi parolas.

Do, tio estis la plej plaĉa loko en montaro kiun tre ofte vizitadis nia kara urso Brundo.

Tamen li ne vivis senzorge, ĉar al la abeloj loĝantaj tie ne plaĉis la ofta urso vizitado. Abeloj estis tre koleremaj al la urso Brundo pro ĝia senĉesa mielŝtelado.

Iun tagon urso Brundo kaŝe alproksimiĝis al la arbo kun mielaj korboj. Sed ĉi foje abeloj atendis ĝin, kaj subite roje ekflugis sur ĝian buŝon pikinte ĝin dolore, tiom dolore, ke la urso Brundo ekfuĝis kilometrojn for de ili.

Jen, nia urso Brundo malrapide, tre lace paŝis sur la larĝa nigra aŭtovojo. Turnas ĝi kapon dekstren kaj maldekstren demandante sin en kiun direkton ĝi ekiru plu. 'Neniu estas antaŭ mi, neniu estas malantaŭ. Kion mi faru?'

Similan bildon oni povis vidi survoje duonhore de kie troviĝis urso Brundo.

Survoje malgaje paŝis juna hundo Žučko. Sur ĝia dorso pendis saketo. Verŝajne ĝia eksa mastro donis iom da nutraĵo por ĝi...aŭ... .

– Kien mi iru plu? Ĉu mi forlasu tiun vilaĝan mallarĝan vojon kaj ekpaŝu sur ĉi tiun larĝan nigran aŭtovojon?

Ambaŭ niaj bravuloj decidis iri antaŭen laŭ aŭtovojo. Tiel okazis ilia renkonto.

Dume la urso Brundo ripozis ĉe la aŭtovojojorondo sidante sur la grundo, kiam ĝi ekvidis la flavan hundeton, nomatan Žučko. La urso Brundo mire rigardis alvenontan hundeton.

– Kio okazis al vi ke vi venas tien for de nenio? Ĉu iu forpelis vin aŭ vi estis hundeto vaganta – scivole molvoĉe demandis la urso Brundo la jus alvenintan hundeton.

– Ja, mi estas surprizita vidi vin ĉi tie. Kial vi fuĝis el via verda montaro? – spite starigis la demandon la hundeto Žučko .

– Mi estis la unua – bonvolu rakonti, kio okazis al vi – ekgrumbli la urso Brundo. Post dek minutoj ili gaje babilis.

– Nu, vidu kia estas nia sorto. Min elpelis abeloj kaj vi estis batita. Ho! Kiom da bastonspuroj videblas sub tiu dorsosako! Vi

vere min malgajigis. Ni iru kune! Eble ni unue trovos bonan laboron por satigi niajn ventrojn.

Apenaŭ ili malaperis malantaŭe de aŭtovojo, kiam ili aŭdis hurusan hundobojadon. Ili estis surprizitaj, ĉar malpli ol kvin minutoj ili estis ĉirkaŭataj de koleraj homoj kaj de iliaj bojantaj hundoj.

– Jen kiu estas bonŝanca – ridetis homo fingre montranta al nia fuĝanta paro.

– Nun ni havas du novajn anojn por du novaj cirkaj programeroj. Ekpelu ilin al la sekva vilaĝo kie ni havos jam interkonsentitan aranĝon kun vilaĝanoj.

Ju pli rapide ili estis kaptitaj kaj metitaj en la drata kaĝo des pli ili estis sciigitaj kion ili faru en la cirko. Se ili ne estus bonaj ludantoj, la atendita vespermanĝo malaperos.

Sub la cirka tendo estis varme kaj sufoko pro la manko da spaco. Aŭdiĝis laŭta muziko, kaj multaj nekomprenablaj konversacioj eĉ blekoj de kaptitaj bestoj. En la aero ŝvebis ekscito. Ĉiuj senpacience atendis alvenon de la vilaĝanoj. Ĉiuj esperis, ke ili profitos bone. Sed okazis pli da bruoj ol faro.

Niaj bravuloj ne povis parkere lerni siajn rolojn, tial novaj mastroj punis ilin resti sen panopeco.

– Nenio estas de vi – kriaĉis unu de mastroj. Tiom da mallerteco mi neniam vidis – bruis tra cirka koridoro.

– Se vi ne plibonigos vian rolon vi havos nek domon nek matenmanĝon! Fek,... fek kun vi! – kriaĉis la nova mastro.

La granda urso Brundo pace atendis ĝis kiam la homo estis malaperinta el ĝia vido, kaj alvokis la hundeton

– Flavulo! Žučko! Aŭdu min, mi decidis fuĝi de tiuj mastroj. Mi estas laca kaj tre malsata . Verŝajne tio okazas kun vi. Do, ni kune fuĝu, ĉu ne ?

– Jes, mi ankaŭ ne deziras resti ligita ĉe arbo kaj vivi tian mizeran vivon. Ni fuĝu kune! Dirite farite.

Jen, ili paŝas liberaj kiel birdeto en aero, kaŝitaj per malhelo gaje marŝis laŭ aŭtovojo.

Ju pli grandas deziro fuĝi des pli kara estas ĝuo en libero.

Subite aŭdiĝis batado de marondoj. Tuj ili rimarkis grandan Lunon banantan en la maro. Ĉielo brilis plena de tremantaj steletoj.

– Ni iru al tiu direkto! Antaŭ ni troviĝas marbordo. Ni estos savitaj – feliĉe bojadis la flava hundeto Žučko.

Veras. Baldaŭ ili troviĝis apud la alta palmoarbo. La urso estis tre laca kaj tuj ekdormis. dum Flavulo Žučko ekpaŝis esplori la trovitan lokon..

Nur 300 metroj for de kie ĝi forlasis amikon, urson Brundo, ĝi ekvidis flosantan objekton faritan el ligno.

La hundeto decidis naĝi ĝis tiu flosanta objekto.

– Eble estas la mastro de la floso sur ĝi? Kion mi faru? Mi estu deca, voste mi ektuŝu liajn piedojn tre tenere kaj li ne estu kolera . – ekpensis la flavulo



– Mi serĉas helpon - diris malrapide Flavulo  
 Žučko ekvidinte starantan homon.  
 La homo diris mallaŭte –  
 Mia nomo estas Plutono sed ĉiuj vokas min Ŝilja.  
 Mi havas kompanjonon. Li estas maristo kaj  
 savanto. Ni savos vin kaj vian amikon – diris li  
 pli agrable aŭdinte la rakonton de nia flava  
 hundeto Žučko.  
 – Via tenera tuŝo montris al mi ke vi estas bona  
 besto. La Flavulo Žučko ekpensis ‘do tenera tuŝo pli  
 valoras ol miloj da flataj vortoj!’  
 – Mi helpos al vi sed via amiko devas puŝi nian  
 flosilon forte for de la marbordo.  
 – Jes. Ĝi ne nur puŝos nian flosilon sed ankaŭ per  
 ĝia alia mano tiros nin al savanta loko.  
 – Kie troviĝas tiu savanta loko – demandis la urso  
 Brundo vekiganta la sekvontan matenon.  
 La urso troviĝas malantaŭ tiu golfeto. Tie homoj  
 estas bonaj kaj neniu batos vin – respondis  
 Plutono nomata Ŝilja.  
 La urso Brundo kaj hundeto  
 Flavulo Žučko estis feliĉaj.  
 Hodiaŭ posttagmeze ni estos savitaj! Vespere ni  
 vespermanĝos, ho kia feliĉo! Morgaŭ estos nova  
 tago. Morgaŭ ni havos novajn amikojn kaj ni  
 havos laboron kaj ĉiutage manĝon!  
 La vivo belas! Do, vi devas ĉiam iri antaŭen !.

Fino. Verkis Jadranka Miric– Zaječar– Serbio



# Poezio

**Wacha Balázs**

## **Mi stultulo mismalŝatas (Dealaĵo, sentoj de tempo al tempo)**



Esperanton mi malŝatas.  
 Esperanton mi tre ŝatas  
 tia estas ambigu’  
 trista ĝuo kun malĝu’

Esperanton mi tre ŝatas.  
 sed deale ĝin malŝatas  
 tia estas ambigu’  
 ted’ , enuo kun reĝu’

Esperanton mi malŝatas  
 Esperanton mi tre ŝatas  
 Nu, mi provos min defendi:  
 mi ne volas tro dependi.

Glosoj:

stultulo - unua persono de singularo Ununombro)

::)

mi - stultulo

deale (laŭ Karolo Piĉ) - de tempo al tempo



# Por infanoj

## Jano kaj la belega reĝidino

— la dua parto —

Oni portis Janon al karcero, kie li devis atendi la morton ĝis mateno.

Ne eblis liberiĝi el la karcero, ĉar tie ĉie estis dikaj kradoj kaj la ekzekutotoj estis profunde sub la tero.

Jano ne volis morti. Ja, li ankoraŭ estas tro juna por saluti Sanktan Petron en la ĉielo.

Kion fari por ke li evitu la morton?

Li sidis malgaje sur la kuŝbenko kaj cerbumis.

Kiel li cerbumis tie, neatendite ekaperis malgranda museto. Ĝi diris al li:



— Mi savos vian vivon, se vi invitos min kaj mian familion al via geedza ceremonio.

— Museto, kiel vi povus savi min? — ekridetis Jano.

— Nun tio ne interesu vin! Ĉu vi invitos min aŭ ne?

— Bone, mi invitos vin — konsentis la junulo. — Mi ne kredas, ke mi sukcesos eviti la morton.

— KREDU min! — diris la museto kaj ĝi malaperis.

Jano pensis, ke la museto nur ŝercis pri li kaj li ekdormis.

Mateniĝante li vekigis je la bruo de la pastro kaj la ekzekutisto.

Li tuj eksaltis por inde atendi la morton. En tiu minuto li ege ekmiris, ĉar lia uniformo malaperis. Anstataŭ ĝi li estis vestita en princa vesto.

Sed pleje surpriziĝis la pastro kaj la ekzekutisto. Ili tuj kuregis al la reĝo, kaj ili raportis, miraklo okazis en la karcero. Hazarde ili enkarcerigis grandsinjoron.

— Kiu vi estas? — demandis mire la reĝo.

Jano ne sciis, kion respondi. Bonŝance la malgranda museto, tie kaŝiĝis ĉe lia brusto inter la brilaj vestoj.

— Diru, vi estas la filo de la najbara reĝo kaj vi deziras edzinigi la reĝidino.

Kial li ne diru tion? — pensis Jano — Pli malbono ne povos okazi al li, ol oni ekzekutos lin.

— Mia reĝa Moŝto, - li komencis — mi estas la filo de la najbara reĝo kaj mi deziras edzinigi vian filino.

La okuloj de la reĝo ekbrilis. Li ĉiam deziris tian edzon al sia filino kaj li volonte akceptis la geedzan proponon.

Li jam tute forgesiĝis pri Jano kaj la ekzekuto. Li tuj ordonis, ke ĉiu prepariĝu al la geedza ceremonio!

Jano duone ĝojis, duone malĝojis. Li ĝojis, ĉar ne okazis sia ekzekuto, sed li malĝojis, ĉar li ne sciis, kio okazos poste.

Se la reĝo ekscios, ke li trompis kaj li ne diris veron, tiam sia kapo falus en la korbon de la ekzekutejo.

Se tamen li sukcesos eviti la morton, kien porti la novedzinon. Li ne havas brilan palacon. Li vivas kun sia maljuna patrino en vilaĝa dometo. Li turnis sin al la museto, kiu kaŝiĝis plu ĉe la brusto.

— Kio okazos poste? Kien mi portu mian edzinon? Ja mi estas malriĉulo. Mi havas nenion krom malgranda vilaĝa dometo.

— Mi diris al vi, pro tio ne ĉagrenu! Mi solvos ĉion.

Jano bone pensis. La reĝo volis vidi la palacon de sia estonta bofilo.

— Nun ĉiu sciiĝos, ke mi mensogis. Estos bone, se mi jam nun iras al la ekzekutejo — li diris preskaŭ plorante.

— Vi ne devas iri al la ekzekutejo — konsolis la malgranda museto — Gvidu la reĝon al via vilaĝa dometo! Mi aranĝos ĉion,, sed ne forgesiĝu pri via promeso.

Jano vole, nevole ekiris kun la reĝo al sia vilaĝa dometo.

Dum la tuta vojo li tremis. Kion diros lia bopatro ekvidante la dometon.

Li ne kuraĝis levi siajn okulojn. Ĝis la domo li rigardis nur la teron.

— daŭrigota —

— Verkis: Apáti Kovács Béla —





# Fabelfiguroj



# Fabelfiguroj

